**GREEN STAR IN CERAMIC:** A decorative green glazed ceramic pin 1¼" in diameter, with safety catch. Very effective as a scatter pin for ladies, 65c each, postpaid. Order from *Central Office of EANA*.

**35-A UNIVERSALA KONGRESO:** 5-12 Aŭgusto 1950, okazos en Parizo. La 'Oficiala Bulteno' anoncis, ke je 17 Februaro jam aliĝis 1,108 personoj el 31 landoj. En la kadro de la programo okazos prelegoj en la Somera Universitato, kaj Literatura kaj Oratora Konkursoj. Aliĝilon vi povas ricevi senpage de EANA.

# JUVELOJ EL LA LITERATURO

## ĈE SAMOVARO

JULIO BAGHY

Ĉe malnova samovaro  
sidas ruso kaj hungaro.  
Dum la akvo zume bolas,  
la amikoj ekparolas:

“Havi landon en libero,  
tamen migri tra la tero,  
iri vojon, sed sencelan . . .  
Ĉu vi konas pli kruelan . . .?”

La hungaro ne respondas,  
liaj pensoj ĝeme ondas,  
viŝas larmon retenitan:  
“Havi landon, sed perditan . . .”

Ĉe malnova samovaro  
sidas ruso kaj hungaro.  
Dum la akvo bolas zume,  
illi ploras, ploras kune.

el “Pilgrimo”.

## NOKTA KANTO

W. HAUFF

En nigra nokto tute sole  
mi staras gardon senparole;  
eraras for la penso mia  
al mia domo familia.

Al la standardo fortirita,  
ho, kiom estis mi kisita . . .  
Mi tiam pensis kun malĝojo:  
Mi vidas vin je l’lasta fojo.

Ho, dormu dolĉe, karaj miaj!  
irante al la litoj viaj.  
Vi nun per preĝo Dion gloras—  
vi certe ankaŭ min memoras.

La horo venis, gard’ alia  
stariĝos nun sur loko mia.  
Mi iras dormi tute laca,  
mi vidos vin en sonĝo paca.

trad. L. Zamenhof.

---

### Poetry for Your Enjoyment — EANA Book Service

(members deduct 10% to June 15th)

<i>Diverskolora Bukedeto</i> , Lorenz, poems fr. 40 nations .....	.70
<i>Elektaĵaj Poemoj</i> , Heinrich Heine, 21 of his best .....	.30
<i>Poemoj por Junuloj</i> , Keyes, easy, highly recommended .....	.25
<i>Se Aŭskultas la Animo</i> , Gezelle, by a Catholic poet .....	.60
<i>Tra l’ Silento</i> , Edmond Privat, 31 pp. of his poetry .....	.35
<i>La Tajdo</i> , Hohlov, ardent poems of love and life .....	.35
<i>Aventuroj de S-ro Longkrurulo</i> , 162 illus. comic rimes .....	.70
<i>Sonoj Novaj kaj Malnovaj</i> , Hesse, poems by a socialist .....	.20

## ESPERANTO-KURSOJ EN NORD-AMERIKO

Dum la periodo Septembro 1949 ĝis Majo 1950, EANA ricevis la jenajn novajn raportojn pri Esperanto-kursoj kaj studrondoj: *Ann Arbor, Mich.*: Studentoj en la Universitato de Miĉigano kunvenis dum la studjaro. *Aurora, Ill.*: Post vizito de norvega samideano, *Georg Olsen*, en Februaro komenciĝis studrondo inter membroj de la Bahaa Kredo. *Eugene, Ore.*: Oficiala korespondkurso sub gvidado de *Prof. J. M. Clifford* en la Universitato de Oregono. *Fitchburg, Mass.*: Semajne ĉe YMCA kunvenas studgrupo depost Aŭgusto. *Hamilton, Ont., Kanado*: Grupo da junuloj sub gvidado de *George Hancocks*, studento, kunvenas en la altlernejo. *Los Angeles, Cal.*: Studrondo kunvenas ĉiudimanche sub gvidado de *R. Mette*, kaj nova komencanta grupo, ĉiumerkrede. *Manchester, N. H.*: Sub la instruo de *Geo. W. Bailey, Jr.*, kurso kunvenas ĉiusemajne en YMCA. *Milwaukee, Wis.*: Kurso ĉiulunde sub gvidado de *Tony Nabby* en Bahaa Centro. *Montreal, Kanado*: Studgrupo sub gvidado de *George Novotny* kaj *C. R. MacDonald* komenciĝis en Decembro. *New York, N. Y.*: Privata kurso sub gvidado de *Ges-roj H. Harrison* dum Septembro. Depost Oktobro okazas kursoj regule sub instruo de *Doris Tappan Connor*, ĉiulunde sub la aŭspicio de Eduka Departemento de ILGWU kaj ĉiumerkrede en Komuna Preĝejo (15-30 membroj). *Racine, Wis.*: Kurso ĉiusemajne sub gvidado de *Tony Nabby* en la Bahaa Centro. *Rochester, N. Y.*: Kurseto dum Novembro por lernantoj en la 8-a studjaro de "Harley School". *Rolla, Mo.*: Studgrupo sub gvidado de *Prof. John M. Brewer* por studentoj de la Kolegio pri Minoj kaj Metalurgio kunvenas regule dum la studjaro. *Sacramento, Cal.*: Kursoj en la Vespera Kolegio ĉiusemajne; *Helene Wolff* instruis de Oktobro ĝis Decembro; depost tiu tempo *S-ino J. E. Carpenter* gvidas la komencantojn kaj *Ida Belle Craig* la progresantojn. *Sanitarium, Cal.*: Kursoj sub gvidado de *Milton E. Davis* — studrondo en la Sanigejo kunvenas regule, kaj nova kurso komenciĝis en Marto, dufoje semajne, en la Kolegio "Pacific Union". *Trenton, N. J.*: Studrondo gvidata de *Howard Borden* kaj *Donald Bushaw* komenciĝis en Marto. *Vimeland, N. J.*: Sub aŭspicio de la Vespera Lernejo, *S-ino Angela Alfaroli* kaj *D-ro C. Sass* aranĝis kaj instruis kurson en Esperanto, de Oktobro ĝis Januaro. *Waterville, Maine*: Kvin studentoj de la Kolegio "Colby" komencis Espo-kurson en Marto sub direktado de lingvo-instruisto. *Wilmington, Del.*: Sub gvidado de *Helen Mihalyfi* kaj *Don Stephens*, de Oktobro ĝis Marto, okazis kurso ĉiusemajne en la YMCA (Walnut Street). *Washington, D. C.*: La "Rondo de Legantoj" kunvenas sub gvidado de *E. G. Dodge*.

# 'INTERNA IDEO' KAJ 'NEŬTRALECO'

W. SOLZBACHER

En la Esperanto-gazetaro aperis multaj artikoloj pri la senco de la "interna ideo" kaj pri la signifo de "neŭtraleco" por la neŭtrala movado, kies internacia organizo estas Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj kiun la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (EANA) reprezentas en Usono kaj Kanado. La uzo de tiuj vortoj, "interna ideo" kaj "neŭtraleco", ofte estas konfuza. En unu artikolo, ekzemple, kritikemulo diris pri *Amerika Esperantisto*, ke "ĝi ne estas redaktata en la spirito de la interna ideo". La verkinto de tiu artikolo nun estas landa peranto (ne en nia lando) de asocio, kiu naskiĝis kun la voko "For la neŭtralismon!" kaj kies oficiala organo skribis en Novembro 1949: "Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la neŭtrala Esperantomovado signifas . . . perfidon."

Estas vere, ke dum la lastaj jaroj la esprimo "interna ideo" ne ofte aperis en nia gazeto. Parolante pri mi mem, mi konfesas, ke en la unuaj jaroj de mia partopreno en la movado mi ofte parolis kaj skribis pri la "interna ideo", sed ke mi nun evitas la uzon de la esprimo. La ĉefa kaŭzo estas, ke mi renkontis tro multajn Esperantistojn, kiuj nomas sian propran ideologion politikan, filozofian aŭ religian "la interna ideo". Se ekzistas cent malsamaj "internaj ideoj", estas saĝe eviti konflikton inter ili. Eĉ D-ro Zamenhof ne ĉiam havis tre klaran ideon pri la diferenco inter la ĝenerale Esperantista "interna ideo" kaj la sistemo de Hilelismo aŭ Homaranismo, kiu estis ligita al certaj religiaj kaj filozofiaj principoj.

Tamen mi tute ne dubas — kaj laŭ mia opinio tre multaj Esperantistoj dubas —, ke nia movado havas ne nur praktikan utilecon, sed ankaŭ idean valoron. Kio do estas la "ideo" de la Esperanto-movado? En ĉi tiu artikolo mi esprimas nur mian personan opinion; farante tion, mi tamen klopodas diskuti la problemon en maniero laŭeble plej objektiva.

La Esperanto-movado disvastigas la uzon de Esperanto en la mondo; sed nur la uzon por *bonestaj* celoj. Se bando de ŝtelistoj, opio-kontrabandistoj aŭ aliaj krimuloj uzus Esperanton, la neŭtrala Esperanto-movado tute ne estus devigata esprimi ĝojon pri tio kaj proponi sian helpon. Same, kiam Esperanto estas uzata por disvastigi evidentajn mensogojn aŭ por subfosi la demokratian konstitucion kaj la liberecon de nia lando, nia "neŭtraleco" tute ne devigas nin toleri tion senproteste.

Tio eĉ troviĝas en la Statuto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko. Artikolo 2 diras, ke "la Asocio estas neŭtrala pri ĉiuj problemoj de religio, politiko kaj socia-ekonomia teorio" sed ankaŭ, ke "respekto de fundamentaj hom-raĵtoj estas esenca kondiĉo por la laboro" de la Asocio. Artikolo 9 diras, ke la Kongresoj de EANA procedas "laŭ la Regularo de Robert" (*Robert's Rules of Order*). Paragrafo 47 de tiu Regularo diras, ke "neniu propono, kiu konfliktas kun la leĝoj de la nacio aŭ ŝtato, estas allasebla", ĉar "neniu regulo konfliktanta kun regulo de pli alta ordo povas havi ian aŭtoritaton".

Esperanto ne estas lingvo de unu nacio aŭ grupo de nacioj, sed kompilaĵo el la elementoj de diversaj naciaj lingvoj. Ĝi do estas "ponto" inter la lingvoj kaj la nacioj, kaj unu el ĝiaj bazaj ideoj estas la konvinko, ke kompreno devas esti ne la produkto de la superregado de unu aŭ alia nacia lingvo, sed okazu "sur neŭtrala lingva fundamento". Tio enhavas la ideon de la esenca egalrajteco de ĉiuj lingvoj kaj popoloj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

Reguleco, simpleco kaj facila lernebleco estas fundamentaj kvalitoj de Esperanto. Tio signifas, ke la lingvo estas uzebla eĉ de personoj, kiuj ne konas fremdajn lingvojn kaj ne apartenas al iu privilegiita klaso de homoj kun longa kaj specialista eduko. Esperanto do estas esence "demokrata" lingvo — laŭ la fama vorto de *Rektoro E. Boirac* ĝi estas "la latina lingvo de la demokratio". Parto de ĝia interna ideo do estas la kredo, ke kiel eble plej multaj homoj devas



partopreni la internacian vivon en reciproka kompreno.

Tiel en la esenco de la lingvo mem ni trovas la elementojn de "interna ideo" por la Esperanto-movado. La samaj elementoj aperas en difino de D-ro Zamenhof: "Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn" (Kongresa Parolado en Cambridge, 1907).

Pri ĉi tiu ĝenerala principo certe ĉiuj membroj de la neŭtrala Esperanto-movado povas facile konsenti. Se tio estas la "interna ideo" — kaj la formulo estas de Zamenhof mem —, neniu povas akuzi nian gazeton, ke ĝi ne estas redaktata en la spirito de la interna ideo. *Amerika Esperantisto* preferas faktojn kaj solidajn argumentojn al nura sentimentala deklamado, sed preskaŭ ĉiuj faktoj kaj argumentoj prezentataj ĉi tie rilatas al la *ideo* de internacia kompreno kaj kunlaboro pere de praktika interlingvo.

La ideo mem de internacia paco, kunlaboro kaj frateco ne bezonas multe da propagando en Usono kaj Kanado en la nuna momento, ĉar preskaŭ ĉiuj personoj en Norda Ameriko sincere akceptas ĝin, almenaŭ teorie. La speciala tasko de nia movado do ne estas paroli en ĝeneralaj kaj malprecizaj vortoj pri *paco* kaj *frateco*, sed montri konkrete la necescon de interlingvo kaj la utilecon de Esperanto ne nur en la estonteco, kiam ĝi estos uzata universale, sed jam en la nuna tempo.

Se ni ĉiuj konsentas pri la celo de paco kaj frateco, ni tamen povas havi malsamajn opiniojn pri la plej bonaj *metodoj* por realigi pacon, pri la *detaloj* de dezirinda *mondorganizo*, pri la rolo de diversaj ideologioj kaj ekonomiaj principoj. La neŭtrala Esperanto-movado devas respekti la rajton de ĉiu membro, havi sian propran opinion pri tiaj problemoj. Ĝi devas esti speciale singarda, kiam temas pri religio kaj politikaj partioj.

Menciante ĉi tiun principon, mi tute ne volas doni la impreson, ke ĝi prezentis aŭ prezentas grandan praktikan

malfacilaĵon por nia Asocio. EANA, same kiel granda plimulto de aliaj organizoj (ne-Esperantistaj) en Nord-Ameriko, praktikas neŭtralecon kaj toleremon en tute natura maniero. Inter la membroj de la Estraro troviĝas anoj de la protestanta, katolika kaj juda religioj, de la demokrata kaj respublikana partioj. Mi estas preta fari veton, ke neniu scias kun ia certeco, kiu estas kiu!

Neŭtraleco pri politiko kaj religio tamen ne signifas, ke nia gazeto devas silenti pri la uzo de Esperanto por politikaj kaj religiaj celoj. Estas necese distingi inter objektivaj *informoj* pri tia uzo kaj *propagando* por la organizoj menciataj. Tamen eĉ en la prezentado de tute objektivaj informoj oni devas konsideri la eblecon de erara impresoj, kiun iu numero de neŭtrala Esperanto-gazeto povus fari al okaza leganto. Do, kiam aperas informo pri uzo de Esperanto por religiaj aŭ politikaj celoj, estas dezirinde, ke la sama numero enhavu tiajn informojn pri *diversaj* politikaj kaj religiaj grupoj.

Neŭtraleco ne postulas, ke Esperanto-gazeto neniam publikigu ion, pri kio kelkaj legantoj povus malkonsenti. Gazeto, kiu malplaĉas al neniu kaj neniam provokas malkonsenton kaj kritikon, estas teda kaj enuiga gazeto. Gazetoj de la neŭtrala movado devas konsideri siajn legantojn kiel maturajn personojn, kiuj estas kapablaj kompreni kaj toleri diversajn opiniojn, se ili ne estas esprimataj en insulta aŭ malobjektiva maniero. Tiurilate leganto devus esti nek pli nek malpli severa pri Esperanto-gazeto ol pri iu alia revuo.

Neŭtrala Esperanto-gazeto devas antaŭ ĉio servi la disvastigon, lernadon kaj uzon de Esperanto. Por tio estas necese, ke ĝia enhavo estu interesa, informa, utila kaj sufiĉe varia por kontentigi diversajn gustojn. Ĵurnalista laboro por la progresigo de la Esperanto-movado estas multe pli grava eĉ de la idea vidpunkto ol la publikigo de sentimentalaj poemoj, en kiuj *amo* rimas kun *flamo*, *standardo* kun *ardo*, kaj *paca* kun *laca*.

## LA ĜOJA PODIO

*La Goja Podio*, de Raymond Schwartz. Titolbildo de R. Laval. 271 paĝoj. Paris, 1949. Esperantista Centra Librejo. Havebla de Amerika Esperantisto. Broŝ. \$1.00, tolbind. \$1.40.

Klopodinte deĉifri longan leteron de samideano, kiu neniam trovas tempon por lerni la gramatikon de Esperanto, sed ĉiam estas preta perdigi tempon al aliaj per neseriozaj proponoj kaj plendoj, mi bezonis distran legaĵon. Mi do prenis la novan libron de *Raymond Schwartz*. Hazarde malferminte ĝin sur paĝoj 107 kaj 108, mi tuj trovis konsolon en mia malespero per la jena trafa rimarko: "Tio pruvas ankaŭ, ke Esperanto vere vivas, ĉar similaj insektoj ne prosperas sur korpo mortinta."

Min amuzis ankaŭ versoj de ĉi tiu speco:

Funde de la maro  
La omaro  
Estas tre ĝentila,

Sed en kaserolo  
Ĝia rolo  
Estus pli utila.

La bonhumoro de Schwartz estas ne nur riĉa kaj originala, sed ankaŭ varia kaj multspeca. Vortludoj, amuzaj versoj, teatraĵetoj, "prelegoj" (mi precipe ŝatis tiun pri "Anagramatiko"), akraj rimarkoj pri homa vanteco kaj malvirto, satira ridado pri diversaj aspektoj de la Esperantomovado, ĉio troviĝas en *La Goja Podio*. Jen eltiraĵo el babilajo "Pri la Insigno de la Kongreso":

"Lastatempe ni ĝuis la viziton de la Amerika Legio, kaj tiu ĉi vizito sugestis al mi ideon, kiun ni povus adapti al Esperanto kun granda profito. Fakte, estas ĉiam ĝene dum niaj kongresoj, kiam ni vidas diversnaciajn samideanojn, ne scii, kiu lando naskis ilin. Fakte, estas tede fari kaj respondi senfinajn demandojn pri: 'El kie vi venas? — Ĉu estas multaj Esperantistoj en via grupo?', k.t.p.

"Praktikaj, kiel ĉiam, ankaŭ tie ĉi la Usonanoj solvis la problemon kaj montras la vojon. Vi sendube rimarkis, ke la membroj de l' pilgrimanta Legio portis uniformajn ĉapojn,

sur kiuj facile legiĝis la nomo de l'devena distrikto. Tiel, kiu ajn Masaĉusetulo povis unuavide ekkoni Konektikutulon, kaj inverse.

"Estus saĝe enkonduki tiun ĉi modon ankaŭ inter ni, precipe dum la kongresoj, kie la plaĉaspekta ĉapeto avantaĝe anstataŭus strangajn kapkovrilojn, kiujn surmetas . . . (ĉi tie ŝajnas preferinde cenzuri kelkajn liniojn . . .) Kaj tuj ĉiu eksciis, el kiu lando vi venas, kaj per kelkaj konvenciacaj signoj oni povus eĉ aldoni, ĉu la ĉapulo kolektas poŝtmarkojn, ĉu li estas vegetarano aŭ fraŭlo, ĉu li (aŭ ŝi) eventuale emus pensi pri geedziĝo, ĉu kun aŭ sen doto, ĉu por la tuta vivo aŭ nur dum la daŭro de l'kongreso, k.t.p.

"Samtempe, dank' al kelkaj aldonitaj galonoj, ni povus tuj ekkoni la delegitojn, prezidantojn, akademianojn, kaj pli speciale la kasistojn, kiujn tiam ni sukcesus eviti ĝustatempe."

La libro, bele presita kaj bindita, enhavas proksimume 85 "pecojn" de miriga varieco. Kelkaj el ili bedaŭrinde ne restas en la limoj de bona gusto, sed la granda, plimulto estas treege amuza, kaj kelkaj estas miniaturaj majstroverkoj. Kelkaj antaŭe aperis en diversaj gazetoj, ĉefe "Franca Esperantisto". Unu el la poemoj estis unue presita en "Amerika Esperantisto".

Cetere dum sia petolado Raymond Schwartz kelkfoje tuŝas problemojn seriozajn kaj tre aktualajn:

Sed mi fidas nur duone  
Al genio de l'homar';  
Ĝi kutimas tro sindone  
Okupiĝi pri misfar'.

Kion saĝe la tekniko  
Nun proponas al konsum',  
Venos morgaŭ el fabriko  
Sub la signo de bum-bum!

Se mi ĉion konsideras,  
Ho, sinjoro profesor',  
Vere, morti mi preferas,  
Kiam venos mia hor'.

Kial vivon plilongigi,  
Kiu estas duon-tomb',  
Se minacas nin mortigi  
Morgaŭ jam atoma bomb'!

*Babi le Mulo.*

## KANADA INFORMO

"*The Western Producer*", populara gazeto por bienistoj en la okcidenta parto de Kanado, eldonite en la provinco Saskatchewan, publikigis diversajn informojn pri Esperanto dum la fruaj monatoj de 1950. *S-ino Violet McNaughton*, redaktisto de la paĝo. "Ĉefe por Virinoj," klarigis iomete pri Esperanto kaj demandis: "Kiom da niaj legantoj interesiĝas pri Esperanto?" Sekvis aro da leteroj en la sama gazeto, kaj post tio *S-ino McNaughton* donis la adreson de EANA al kiu la legantoj povus skribi por informo. La Centra Oficejo jam ricevis multajn leterojn — kaj eĉ gajnis kelkajn novajn membrojn: *Crawford Baker*, Saskatchewan; *S-ino Ida F. Johnston*, Alberta; kaj *S-ino M. J. Brady*, Alberta. Bonvenon al vi ĉiuj!

*Du gravaj mondfamaj kompanioj* aperigis artikolojn pri Esperanto en siaj gazetoj por oficistoj kaj laboristoj. En la gazeto "*Westinghouse News*" de Hamilton, Ontario, aperis artikolon pri *Jim Hartley*, tradukisto por la kompanio dum 30 jaroj. Oni menciis ke *S-ro Hartley* estas konata Esperantisto. En la gazeto "*Spanner*" de la fervojo-kompanio "*Canadian Pacific*", artikolo rakontas pri oficistino de Nederlanda Filio de la kompanio, kiu prezentis lumbildojn pri la fervojo kun prelego en Esperanto antaŭ Kristana Esperantista grupo en Nederlando. La gazeto presis trafan paragrafon en la lingvo Esperanto por montri kiel aspektas la interlingvo.

*La kuraĝaj fratoj Smith*, kiuj gajnis mondfamon pro veturo trans la oceanon de Dartmouth, Nova Scotia, al Dartmouth, Anglujo, en malgranda boato, denove troviĝas en Halifax, Nova Scotia. Ili okupas sin pri boatkonstruado kaj planoj por "Nova Espero" kiel kolonioj. Multaj gazetoj tra Eŭropo kaj Nord-Ameriko publikigis novaĵon pri la du bonaj fratoj. Laŭ anonco, la oficiala lingvo de la fondotaj kolonioj estos Esperanto.

## ESPERANTO-KRONIKO

*En la mondkonata serio* de prelegoj en Town Hall, New York, Esperanto-programo okazis la 14-an de Februaro sub la prezido de la Eduka Direktoro de Town Hall, *Thurston Davis*. La Prezidanto de EANA, *D-ro W. Solzbacher*, klarigis la interlingvan problemon kaj ĝian solvon per Esperanto. La Ĝenerala Sekretario de EANA, *G. Alan Connor*, montris la strukturon kaj praktikajn uzojn de Esperanto. *Doris Tappan Connor*, helpata de sia edzo kiel "tradukaparato", prezentis efikan provlecionon laŭ la Csehmetodo. Okazis longa demando-kaj-respondo-periodo. Oni vendis ekzemplerojn de la libro *Esperanto: The World Interlanguage*, de kiu la prelegintoj estas la ĉefaj aŭtoroj.

Ĉefaj religiaj gazetoj nun aperantaj en Esperanto estas: *Dia Regno*, evangelia kristana, eldonata en Svedujo, jara abonprezo \$.85; *Espero Katolika*, katolika, eldonata en Nederlando, abono \$1.25; *La Dharmo* (La doktrino de Budao), budaista, eldonata en Svedujo (Venavägen 49, Örebro). *Dia Regno* kaj *Espero Katolika* estas aboneblaj per nia Libroservo.

*La famkonata libro de Prof. Mario A. Pei*, de Columbia-Universitato, "The World's Chief Languages" (La ĉefaj lingvoj de la mondo), de kiu tri eldonoj aperis en New York, nun ankaŭ estas publikigita en London, Anglujo. Kiel la usona eldono, tiel ankaŭ la brita eldono enhavas 27-paĝan ĉapitron pri Esperanto verkitan de *G. A. kaj D. T. Connor*. La 663-paĝa libro prezentas fidindan kaj interese-gan analizon kaj priskribon de pli ol 25 lingvoj.

*Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista* por 1950 aperis en Dublin, Irlando. Gi estas la 5-a eldono de tiu verketo kaj enhavas sur 24 paĝoj centojn da adresoj kaj korespondanconoj de katolikaj Esperantistoj en 30 landoj, inter ili Usono, Kanado kaj Kubo. Havebla por 2 respondkuponoj de Lorcan Oh Uiginn, Bothar Glasard 16, Dublin.

## ESPERANTO-KRONIKO

*The New International Year Book* (Nova Internacia Jarlibro) de la fama eldonejo Funk & Wagnalls, N. Y., en la 1950-eldono denove enhavas detalan artikolon (1200-vortan) pri Esperanto. Verkita de D-ro W. Solzbacher, ĝi raportas pri la progresoj de Esperanto dum la jaro 1949.

"*Mensoga Vespero*" okazis en programo de la vigla Esperanto-Klubo en Sutton, antaŭurbo de London, Anglujo. Brita Esperantisto rimarkigis: "Iu cinikulo sugestas, ke la subtitolo sendube estas 'Miaj kongresaj spertoj' . . ."

"*Kio estas Rotario-Klubo?*" estas interesa broŝuro multobligita, en bele presita kovrilo, kiun eldonis en Esperanto la Komitato por Internaciaj Servoj de la Rotario-Klubo de Te Awamutu, Nov-Zelando. Ni esperu, ke la klopodoj de la aŭtoro, S-ro A. J. Sinclair, eminenta Rotariano kaj Esperantisto en Nov-Zelando, kaj de aliaj Rotarianoj Esperantistaj, ekz. la EANA-Estrarano Gilbert Nickel, la Ĝenerala Sekretario de UEA, Cecil C. Goldsmith, kaj la Prezidanto de UEF (Unuiĝo Esperantista Franca), Georges Warnier, revekos la intereson de la Rotario-Internacio, kies sidejo estas en Chicago.

*Protestantaj kaj katolikaj diservoj* kun predikoj kaj himnoj en Esperanto nun okazas sufiĉe ofte en diversaj landoj. La plej konata estas la ĉiumonata diservo en Londono (Britujo), kiu regule okazis dum 40 jaroj kun predikantoj el diversaj kristanaj eklezioj. Ĝi nun estas organizata en la Preĝejo de Sankta Barnabo. En Budapest (Hungarujo), "Biblia Horeto" okazis antaŭ nelonge dum la Protestantaj Tagoj. En Viena (Aŭstrujo), katolikaj diservoj okazas kun Pastro G. Planck kiel predikisto. En Buenos Aires (Argentino), Pastro Juan Ortega, S. J., Pastro Antonio Canali, O.F.M., Pastro Luis J. Plandolit, O.F.M., kaj Pastro Bruno Ostropolski predikas en Esperanto en diservoj organizataj de la loka Katolika Esperanto-Asocio.

## ESPERANTO-KRONIKO

*Internacia Scienca Asocio Esperantista* publikigis liston de 19 sciencaj kaj teknikaj verkoj publikigitaj en Esperanto dum la periodo 1948-1949. Inter ili estas: *F. J. Belinfante*, Supermultatempa Teorio por Mezonoj; *J. Ota*, Malhelpa Afiniteco de Benezdrino-derivaĵoj al Amino-oksidado; *L. Oterma*, 5-decimalaj valoroj de  $x$ ,  $\sin x$ ,  $\cos x$ ,  $\operatorname{tg} x$ , kun  $x$  en radianoj; *J. Yosida* kaj *S. Miyahara*, Pri la teorio Aloj-teorimaniera de Feromagnetismo.

*La dua numero de la "Informilo"* de la Centra Oficejo de EANA aperis en Marto kun multaj interesaj raportoj, inter ili "Rondvojaĝo inter Klubanoj" de Doris kaj Alan Connor. Se iu membro de EANA erare ne ricevis la *Informilon*, li aŭ ŝi bonvolu sciigi la Centran Oficejon. La *Informilo* ne estas abonebla, sed estas sendata senpage al la membroj de nia Asocio.

*The World Almanac* (Monda Almanako) por 1950, New York, enlistigis la Esperanto-Asociacion de Nord-Ameriko inter la "Usonaj Asocioj kaj Societoj" sur paĝo 581.

*En Romo, "Amerika Esperantisto"* trovis intereson kaj efike helpis Esperanto-varbadon en la Internacia Kolegio de la Kapucena Ordeno, kie kunestas pastroj kaj studantoj el tuta mondo. *Pastro Sigismondo*, kiu estas polo kaj malnova Esperantisto, skribis: "Vi gajnis, eĉ ne sciante, Pastron Berardon, hincan kunfraton, per via gazeto." Juna teologistudento el la Insulo Malta, *Frato Donatus Spiteri*, skribis: "Dum la somera liber-tempo, kun 13 kunfratoj, mi ĉeestis mallongan Esperanto-kurson de la bona itala Esperantisto, E. Filippi. Mi treege ŝatas la gazeton *Amerika Esperantisto*. Ĝi estas vere bela kaj interesa." *Pastro Sigismondo* ankaŭ raportis: "Nia kunfrato, *Pastro Pio da Siena*, konvinkis multajn kolegojn en la Kolegio de la Vatikana Kongregacio por la Propagando de la Kredo, speciale ĉinojn kaj japanojn, pri la neceseco de nia lingvo."



## ESPERANTO-KRONIKO

*Memoirs of the Faculty of Science*, Kyusyu Universitato, Hukuoka, Japanujo, presis en sia Serio A, Volumo IV, kvin longajn matematikajn artikolojn en Esperanto de *Tokui Sato* kaj *Masuo Hukuhara*. La nomoj de la artikoloj estas: "Pri Fikspunkta Teoremo", "Pri Etendado de la Teoremo de Carleman-Hukuhara Rilate al Asimptotaj Serioj", ktp.

*Multaj katolikaj gazetoj* en Usono kaj Kanado enhavis informojn aŭ almenaŭ mencion pri la Internacia Katolika Esperanto-Kongreso okazonta en Romo. Speciale interesa artikolo tiuspeca aperis en *The Witness*, Dubuque, Iowa, kun aldono de ĝeneralaj informoj pri Esperanto. *Catholic School Journal* (Katolika Lerneja Ĵurnalo) en Milwaukee enhavis artikolon pri Esperanto en Decembro.

*Esperanto tre utilis* al vojaĝanta nederlandanino en la ŝtato Kalifornio, laŭ informo de samideano *John M. Steinwinder* de San Francisco. Li raportis jene: "Somere mi laboras kiel ŝoforo de Taksifiakra Kompanio. Pasintan someron mi sidis en mia fiakro ĉe stacidomo atendante klienton, kiam juna fraŭlino kuris el la domo kaj metis noton en mian manon. Sur la noto estis skribite angle 'I just arrived from Holland. I can't speak English. Please take me to the depot so that I may catch the train to San Mateo' Nu, mi tion faris, kaj kiam ni alvenis ŝi donis al mi sian bileton kun pledo de la okuloj, kiuj diris: 'Helpu min!' Do, mi multon faris por aranĝi aferojn, kaj trovis ke ŝi necesos poste ŝanĝi al aŭtobuso survoje, ktp. Mi penis klarigi la situacion al la fraŭlino angle, sed ŝi ne komprenis. Do, fine mi provis Esperante! Ŝi tuj ridetis, komprenis, kaj la problemo solviĝis! Mi donis al ŝi novan noton por montri survoje al biletofacejoj, ktp, kaj mi aŭdis poste ke ŝi bone alvenis en San Mateo. Fakte, depost ŝia reveno al Nederlando, ŝi nun korespondas kun mia edzino kaj mi — Esperante, kompreneble!

---

## DEZIRAS KORESPONDI

---

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

*Argentino.* Luis Vicino, Maza 1450-23/7, *Buenos Aires*. Kontraŭ sendado de malgrandaj tipaj objektoj, pentraĵoj, manfaritaj aĵoj el via lando, mi sendas kompletajn seriojn de rememora kaj aeraj, neuzitaj PM el Argentino. Skribu unue. Interŝanĝo de PM ne interesas min.

*Bulgarujo* H. D. Zlatarev, *Hedeze*, ur. Ĉirpan. 47-j. kemioteknikisto dez. kor. pri profesiaj kaj sciencaj temoj.

*Ĉekoslovakio.* Arnošt Kristek, Poruba N. 70, *Orlova III*. Dez. kor.

*Ĉekoslovakio.* Ivan Krousky, Jirasek-Gimnazio, *Nachod* 802. Dez. kor. kaj interŝ. PM aŭ il. PK.

*Hispanujo.* Francisko Kurto, Martin Molins 24, *Barcelona* 13. Dez. kor. sed nur kun tuta amerika kontinento. Krom Esperante vi povas skribi angle, france, itale, portugale kaj hispane, sed mi respondos nur Esperante aŭ hispane.

*Japanujo.* Esperanto Koresponda Grupo, 260 Oka-Shinmachi, Hirakata, *Osaka*. 200 anoj dez. kor. kaj interŝ. il. gazetojn, PK, PM, kun geusonanoj. Nepre garantias respondon.

*Japanujo.* M. I. Kegami, Hukuokamaĉi 1006, *Tojamaken*, 18-j. agrikultura teknikisto dez. kor. kun 4-H klubanoj, k. a.

*Madagaskaro.* S-ro J. Dequaire, Station Agricole de l'Ivoloina, *Tamatave*. Dez. kor. pri ĝardenkulturo, agronomio, Esperante kaj ankaŭ angle.

*Nederlando.* Barth van der Bruggen, Schuttersgracht 30, *Gorinchem, Ned.*, kursgvidanto, petas por siaj gekursintoj (18 ĝis 50 j.) korespondadon. Ĉiu letero estos garantiata respondota. Pri ĉiu temo estas petate. Letervespero estos 1-a Majo.

*Svedujo.* Direktoro Walfrid Wallin, Torggatan 1, *Skövde*. Dez. interŝ. PM kun seriozaj filatelistoj. Certe respondos.

*S-ro Kiyosi Ikegawa*, Japana Esperantisto, estas hazarde gajninta partoprenan rajtigilon (Fellowship) de Unuigitaj Nacioj. Li studos en Anglujo dum ses monatoj. Ĝis nun, S-ro Ikegawa planis viziton al Usono, kaj skribis al multaj geesperantistoj en diversaj urboj pri lia vizitplano, sed nun li devas ŝanĝi la planon por Anglujo. Lia intencas viziti Usonon post la sesmonata studado en Anglujo, survoje al Japanujo tra Usono. Lia provizora adreso estas jene, kaj li atendas en Londono leterojn de Usonaj geamikoj: *K. Ikegawa, c/o Mr. C. H. Bingham, 20 Midhurst Ave., Muswell Hill, London, N. 10, England.*

## IMPORTANT WORKS AT SPECIAL PRICES

*NOTE*, that when you buy books from the *Esperanto Association of North America*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

### "Universala Esperanto Metodo" by Dr. Wm. S. Benson

This great Esperanto book is again available. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and table of correlatives in 36 languages. Wonderful picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary — also *krestomatio* of fables, stories, humor, etc., all profusely illustrated — complete picture-dictionary in Esperanto, with most common words given in 40 languages. Encyclopedic and unique. Large volume, beautifully cloth bound, stamped in gold, 560 pp., all for \$6.00 (members deduct 10% up to June 15; i.e. send \$5.40 now).

### "The World's Chief Languages" by Dr. Mario A. Pei

Famous guide to the languages of the entire world, incl. *ESPERANTO*. Formerly titled "*Languages for War and Peace*." New 3rd edition. Full grammatical surveys of world's great languages, with vocabularies — also alphabets and illustrations of the lesser languages, incl. many strange native tongues; and language history with linguistic maps — all written in interesting and easy-to-understand style. Text and vocabulary equivalents in English. A reliable guide for every student of language and languages. Big cloth volume, 663 pp., price \$6.00 (members deduct 10% up to June 15; i.e. send \$5.40 now).

---

## THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

### ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.


The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write for details of our special *Linguaphone* offers.

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is **unique**, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one **and** only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. **NOW**, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by **Mr. and Mrs.** Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.



The complete "Connor Course" includes **the** following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage*."
- (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow 'Study Guide' (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of **E** Mrs. Connor.
- (5) Supply of answer paper and printed **return** envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop **your** vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of *Achievement*".

**ENROLL NOW FOR LOW COST:** The "Connor Course" is regularly priced at \$36, but **members** of EANA who enroll **now**, in advance, will receive **the** course for *only* \$30 (16⅔% discount). Shipment **about** May 15th. Delivered to you with a full money-back **guarantee**. So, place your order **NOW**:

**Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St. New York, N.Y.**